Aleksander Korĵenkov

UNU RINGO ILIN REGAS

J.R.R. Tolkien en Esperanto

Aleksander Korĵenkov

UNU RINGO ILIN REGAS

J.R.R. Tolkien en Esperanto

Ĉi tiu libro estas elŝutita el la
Kiosko de Sezonoj
http://esperanto.org/Ondo/Libroj/Libroj.php

Mi sidas apud fajr', pensante
pri l' vivo konsidere,
pri razenfloroj, papilioj,
viditaj prasomere;
pri foliflavo kaj filandro
aŭtune fantaziaj,
kun nebulet' kaj sun' arĝenta,
kaj vent' tra l' haroj miaj.

Mi sidas apud fajr', pensante
kia la mondo estos
dum vintro, kies primaveron
mi mem ne vivatestos.
Ĉar multas la aferoj, kiujn
ne konis miaj spertoj:
ja ĉiujare dum printempo
malsamas arbaj verdoj.

Mi sidas apud fajr', pensante
pri l' homoj de l' fondiĝo,
kaj tiuj, kiuj vidos mondon
post mia elmondiĝo.
Sed dum mi sidas kaj pripensas
pratempajn memorkroĉojn,
mi volus aŭdi revenantojn
kaj ĉe la pordo voĉojn.

En 1997 BBC informis, ke, en enketo pri 100 plej gravaj literaturaj verkoj de la 20a jarcento, la unuan lokon gajnis *La Mastro de l' Ringoj*, per trione pli da voĉoj ol la plej proksima konkuranto. Kvankam ankaŭ la vendostatistiko pruvas, ke tiu

enketo ne trompas kaj ke la romano de Tolkien fariĝis apartenaĵo de la homara kulturo, iujn doktajn literatur-fakulojn agacas, ke la verkojn de "veraj klasikuloj" najbaras hazarde eldonita mirfabelo, kiun oksforda filologo John Ronald Reuel Tolkien komencis kiel ĉekamenan rakonton *La Hobito* al la propraj infanoj.

Sed *La Mastro* fariĝis kulta romano[1], unu el tiuj, kiujn oni ne nur legas, sed ankaŭ *vivas* malgraŭ la banala enhavo, jene resumita en *Silmariliono*:

> Laŭ konsilo de Mitrandiro, duonulo Frodo surprenis la pezan taskon, kaj sole kun sia servisto, pasis tra la danĝeroj kaj mallumo, atingis la Monton de Sorto kaj tie li ĵetis la Ringon de l' Potenco en la Fajron, en kiu ĝi estis forĝita; tiel la Ringo estis neniigita kaj ĝiaj misfaroj malaperis.

Ordinara mirfabelo apenaŭ kapablus lanĉi lavangon da epigonoj, adorantoj kaj imitantoj. Kaj kvankam en sia fabela mondo Tolkien priskribas tradician intrigon – temas pri batalo inter la Bono (Lumo) kaj Malbono (Mallumo), – atenta leganto baldaŭ konstatas, ke ĝi estas ne tute ortodoksa, se oni konsideras, ke en *La Mastro de l' Ringoj* la historio de Mez-Tero estas nur finrakontata.

Silmariliono, kiun Tolkien taksis pli alte ol *La Mastron*, ĉapitron post ĉapitro evidentigas, ke la elfreĝoj – tiel noblaj kaj nobelaj en la kantoj kaj legendoj de *La Mastro* – ofte montras sin despotaj, kovardaj kaj murdemaj. (Kompreneble, ili murdas kaj despotas por starigi la Juston.) Kaj leganto kontraŭvole ricevas impreson, ke la misan agadon de la Mallumo kelkfoje provokis la Lumo mem; dum la konduto de la Valinora panteono suspektindas pri miso – tion montras, ekzemple, la historio de Numenoro, kies loĝantaron la ĉiopovaj valaroj simple dronigis.

---

1 En la rusa literaturo oni kutime parolas pri tri kultaj romanoj. Du el ili jam aperis en Esperanto: *La Majstro kaj Margarita* de Miĥail Bulgakov (tradukis Sergio Pokrovskij) kaj *Pikniko ĉe vojrando* de fratoj Strugackij (tradukis Mikaelo Bronŝtejn). La plano de *Sezonoj* eldoni la trian – *Moskvo-Petuŝki* de Venedikt Jerofejev – ne realiĝis. Sed kio pri kultromanoj usonaj?..

Do ĉe Tolkien la Bono estas foje makulhava, kaj la Malbono foje estas prava – tio lezas la regulojn de l' ĝenro, postulanta triumfon de la senmakula Justo, eĉ koste de la vivo de la ĉefheroo. Do aperis amaso da apokrifaj historioj, kaj pluraj el ili estas verkitaj vide el la alia flanko – la *Nigra Kroniko de Ardao* kun Morgoto kiel "La Majstro", kruele torturita de la "totalisma" Valinora reĝimo. Kaj en tiu alternativa mondo plimultaj el la ambaŭflanke militantaj kavaliroj kaj ordinaraj mez-teranoj estas malfacile klaseblaj kiel "lumaj" aŭ "mallumaj", pluraj el ili "nur plenumis la ordonojn".

Kvankam Tolkien neniam taksis *La Mastro*n *de l' Ringoj* alegoria, malmultaj el la zelotoj evitis trakti ĝin alegoria priskribo de realaĵo kun specifa "mesaĝo". Ni, homoj, ne facile kredas, ke iu kapablas fordoni jarojn nur por plezuro krei fikcian mondon, loĝigi ĝin per fantastaj personoj kaj enmeti en ĝin magiajn rimedojn.

Entuziasmuloj serĉas analogiojn en nia historio, trovas ilin kaj projekcias al la mondo Tolkiena. "Temas certe pri la ideologia kontraŭstaro inter la luma Okcidento kaj la malluma Oriento", – diras iuj. Aliaj asertas, ke la Unu Ringo por Ĉiujn Regi estas nuklea energio tre danĝera en la manoj de la Malbono, sed uzebla por bonaj celoj, ktp. Amuzis min ekstravaganca artikolo en porjunula revuo ruslanda, kies aŭtoro penas pruvi, ke Tolkien montras nenion alian ol la *Dia*n *Komedio*n de Danto, kaj ke magiisto Gandalfo rolas kiel Vergilio.

Tamen apokrifoj kaj pastiĉoj[1] pri la verko mem de Tolkien estas nur parto de la subkulturo de la tolkienista komunumo (T-komunumo), kiu – samkiel la komunumo esperantista – originis el libro.

En la T-komunumo ekzistas kerna T-movado, daŭriganta kaj propagandanta la ideojn de sia Majstro kaj kun granda rezervemo evoluiganta ilin. Ĝisostuloj konsideras veraj (ni

1 Verkoj similaj al *El la Verda Biblio* de Izrael Lejzerowicz estas proporcie pli multaj en la T-literaturo ol en la E-literaturo.

diru, Fundamentaj) nur la verkojn de la Majstro mem, kiuj estis eldonitaj dum lia vivo, kaj ili malakceptas eĉ la 12 volumojn pri la historio de Mez-Tero, kiujn editoris lia filo Christopher Tolkien, kaj kiujn tamen akceptas (kaj ĝuas) la plimulto de la komunumanoj. Surloke la adeptojn ligas kluboj tre malsamaj, ofte nomataj rolludaj kluboj.

Mirigas la kvanto de la kantoj kaj poemoj; centojn da ili mi trovis en hazarde pruntita T-lumdisko, tamen mi baldaŭ rezignis de legado – la temaro kaj la kvalito tro memorigas pri la Esperanta poezio antaŭ la Unua Mondmilito, kaj ne necesas esti profeto por diri, ke tiu literaturo apenaŭ ĝuos popularecon ekster la tolkienistaro. Ni diru, ke la "ĝisostuloj" ne akceptis la tripartan furorfilmon de Peter Jackson, kiu kromrezulte instigis reeldonojn de la Libro. Laŭ ili, la filmo devus nur strikte sekvi la romanon, sed ne profani ĝin. Cetere, kvankam la filmo starigis spektorekordojn, ĝi ne havis daŭran furoran efikon, kiun la Libro havas jam dum kvindek jaroj.

Ni jam menciis la ekziston de la originala T-literaturo kaj de la reformemuloj (la *Nigra Kroniko*), sed ekzistas ankaŭ T-retforumoj kaj T-gazetaro (tiu lasta ŝajnas esti malpli abunda ol la esperantista, almenaŭ en Ruslando). La kongresa oferto en Tolkienujo estas riĉa – de semajnfinaj seminarioj, ĝis semajnaj tendaroj (Grandaj Hobit-Ludoj). Iuj T-aktivuloj ŝatas dum monatoj migradi petveture de urbo al urbo, kaj de lando al lando, uzante T-adresarojn. En la rendevuoj tolkienistaj oni ja prelegas kaj diskutas, sed pli multajn allogas kantokoncertoj, rol-ludoj kaj neformalaj babilkunvenoj.

Multaj el la nuntempaj T-aktivuloj opinias, ke ne la Tolkiena mondo, sed la Tolkiena komunumo mem estas la ĉefa valoro por la adeptoj de la afero, kiu

> … iom post iom transformiĝas al movado, unuiganta kreajn personojn kun malsamaj profesioj, aĝoj kaj karakteroj, kiuj tamen komprenas unu la aliajn kaj kune serĉas sian lokon en la mondo. En tiu rondo de samideanoj, personoj – kiuj antaŭe konsideris sin nekomprenitaj kaj nebezonataj – retrovas la

> memestimon, forĵetas la “minuskomplekson”, trovas verajn geamikojn kaj novajn aplikosferojn por siaj kapabloj.[1]

Alia specifaĵo de la T-komunumo estas intereso al lingvoj. T-aktivuloj el ekster Anglalingvujo strebas lerni la anglan por paradi sian konatiĝon kun la originalaj verkoj. Sed ĉeestinte T-renkontiĝon, mi konstatis, ke kelkaj vigle babilis elfe kaj interparolis elflingve pri la elfa lingvo mem. La Majstro ja skizis nur la bazon de la mez-teraj lingvoj, kaj la adeptoj evoluigas kaj pliriĉigas ilin.

Sed neniu esperantisto konsideru la tolkienistan lingvemon premiso por sukcesigi Esperanton inter la adeptoj de Tolkien. Tio havus ne pli da sukceso ol enkonduko de volapuko, sanskrito aŭ japana lingvo en Esperantujo. La lingva problemo estas solvita en Mez-Tero: la lingvo por la kontaktoj inter la popoloj estas Okcidentaĵo (*Westron*); kaj pluraj specioj – inter ili ankaŭ la hobitoj kaj preskaŭ ĉiuj civilizitaj homoj – forgesis siajn lingvojn kaj uzas la Komunan Lingvon ankaŭ en la interna familia vivo. Laŭ Tolkien, *La Mastro de l’ Ringoj* estis originale verkita en Okcidentaĵo, kaj li nur tradukis ĝin en la anglan.

Eble la efiko povas estis mala. Laŭ Eugène de Zilah:

> Tiom da rilatoj ekzistas inter la “interna ideo de Esperanto” kaj la kunigaj principoj estrantaj la mondon de Tolkien, ke ne surprizus min, se *La Mastro de l’ Ringoj* fariĝus la “Odiseado” de la esperantoj.[2]

Ĉi tie ni ĝisrevidu la tolkienistaron kaj revenu al la Iniciatoro, por kies vivpriskribo mi uzis plejparte la biografian skizon de David Doughan, el la retejo de la Tolkiena Societo.

John Ronald Reuel Tolkien naskiĝis la 3an de januaro 1892 en la sud-afrika urbeto Bloemfontein, kien lia patro kun sia fianĉino venis antaŭ kelkaj jaroj el Anglio. Post la morto de

---

1 Ŝamaĥanova Je. *Zaĉem ĉeloveku koljĉuga* [Kial oni bezonas maŝkirason] // *Uraljskij Sledopyt*, 1994, №9, pĝ. 68.

2 *La Gazeto*, 1997, №71. pĝ. 14.

la patro (1896) la restintaj familianoj revenis al Anglio, kie lia patrino konvertiĝis al la romkatolikeco, ankaŭ la juna Ronald (ĉi tiu nomformo estis familiara), kiu restis fidela romkatoliko dum sia tuta vivo. Post la morto de la patrino (1904) pri Ronald kaj lia pli juna frato Hilary zorgis kiel kuratoro romkatolika pastro Francis Morgan.

En lernejo la juna Tolkien montris neordinarajn lingvo-kapablojn, kaj danke al sia bona studado li sukcesis studentiĝi en Oksfordo, unue en la fakultato klasik-lingva kaj poste en la fakultato de la anglaj lingvo kaj literaturo. Laŭ rememoroj, tiutempe li legis poemon *Kristo* de la mezepoka anglosaksa monaĥo Cynewulf, kies du versoj frapis lian imagon:

Eálá Earendel engla beorhtast
Ofer middangeard[1] *monnum sended*

(Saluton al vi, Earendel, la plejhela anĝelo,
Super la Mez-Tero sendita al homoj)

Komenciĝis la Unua Mondmilito, sed li, ne infektita de ŝovinismo, plu verkis poemojn kaj elpensis lingvojn, interalie Qenya (poste Quenya), kiu tiam havis finnan influon. Fine, aliĝinte al la armeo, antaŭ foriro al la batalkampo li geedziĝis la 22an de mar 1916 kun Edith Bratt – ili konatiĝis ankoraŭ en 1908, kiam Ronald estis 16-jara, kaj ŝi 19-jara. Tiutempe li verkis *Kanto*n *pri Earendilo*, maristo kiu iĝis stelo. Post kvarmonata deĵoro ĉe fronto li ekmalsanis kaj en novembro 1916 revenis al Anglio. La malsano regule revenis, kaj li daŭrigis sian armean servon en Anglio mem. Ankoraŭ dum la milito li ekverkis mitologian *Libro*n *de perditaj rakontoj* (ĝi aperos posteume). En maloftaj feriaj okazoj li kun Edith multe promenis en arbareto apud la armea kampadejo en Roos kaj, laŭ rememoroj, en tiu

1 *Middangeard* estas angla nomo por la homloĝata mondo inter la supra Ĉielo kaj la malsupra Infero.

arbareto ŝi kantis kaj dancis por li. Tiel naskiĝis la plej bela parto de *Silmariliono* – legendo pri la amo de mortema homo Bereno kaj senmorta elfa damo Lutiena Tinuviela. La 16an de novembro 1917 naskiĝis ilia unua filo, John Francis Reuel, estonta pastro Johano Tolkien.

Post la militofino kaj nelonga laboro en la redakcio de *Oxford English Dictionary*, li akiris konkurse vicprofesoran postenon pri la angla lingvo en la universitato de Leeds, kie li daŭrigis la verkadon de sia *Libro de perditaj rakontoj* kaj kompiladon de "elfaj lingvoj". En amika etoso de la *Vikinga Klubo* li prezentis drinkkantojn kaj poemojn en la malnovangla, malnovislanda kaj gota lingvoj. En Leeds naskiĝis liaj du filoj (Michael Hilary Reuel en 1920 kaj Christopher Reuel en 1924), kaj en 1925 li akiris profesorecon pri la angla-saksa lingvo en Oksfordo. Post 20 jaroj li ŝanĝis la oficon kaj iĝis profesoro pri la angla en la kolegio Merton, kie li laboris ĝis sia emeritiĝo en 1959. Lia profesia kariero ne estis elstara; liaj fakaj verkoj aperis tre malofte, kaj ni ne plu atentu ĝin. Lia sola filino, Priscilla, naskiĝis en 1929. Por siaj infanoj li verkadis ilustritajn leterojn de Julavo (eldonitaj posteume en 1976 kiel *The Father Christmas Letters*) kaj antaŭ dormo legadis longajn fabelojn (iuj el ili poste estis eldonitaj).

Tolkien rakontis, ke foje, kontrolante en la hejmo ekzamentaskojn, li tute senkaŭze skribis sur pura kajerfolio la vortojn: "In a hole in the ground there lived a hobbit"[1]. Li do decidis esplori, kio estis la hobito, kial li vivis en tertruo, ktp. El ĉi tiu frazo fontis ankoraŭ unu fabelo, kiun li voĉlegis al siaj infanoj. Li eĉ ektajpis ĝin por montri al kelkaj konatoj, kaj en 1936 la *sola*(!) tajpita ekzemplero, hazarde trafis en la manojn de Susan Dagnall el la eldonejo *George Allen and Unwin* (en 1990 ĝi kunfandiĝis kun *HarperCollins*). Susan petis Tolkienon fintajpi ĝin kaj poste donis ĝin al la eldonejestro Stanley Unwin. Tiu pludonis ĝin al sia dek-jara filo Rayner, kredante ke porinfanan literaturon prefere taksu infanoj. Rayner degnece aprobis ĝin

1 "En truo en tero vivis hobito", – tradukis Christopher Gledhill.

kiel bonan legaĵon por infanoj malpli aĝaj ol li mem, kaj en 1937 *La hobito* estis presita.

La hobito havis furoran sukceson, kaj jam dum 70 jaroj ĝi neniam malaperas el la furorlistoj de la porinfana literaturo. Unwin do demandis Tolkienon pri similaj tekstoj. Tolkien nature proponis sian mitologian verkegon, kiu nun havis la titolon *Quenta Silmarillion*, aŭ koncize *Silmarillion*.

Tamen eldoneja eksperto malkonsilis eldoni ĝin pro evidenta komerca malsukceso. Unwin ĝentile klarigis al Tolkien, ke *Silmariliono* ne estas eldonebla, kaj petis lin verki daŭrigon de *La hobito*.

Tolkien konsentis, sed la daŭrigo estis verkata dum 16 jaroj, kun multaj paŭzoj. La verkado estis komplika, ĉar Tolkien deziris, ke la nova teksto estu daŭrigo kaj de la porinfana *La hobito* kaj de la porfakula *Silmariliono*. Tro malsamaj ili estis, sed, fine la komuna punkto estis trovita – la ringo, kiun la hobito Bilbo trovis en kaverno, iam apartenis al Saŭrono, la ĉefhelpanto de Morgoto, la ĉefa malheroo de *Silmariliono*.

Unwin ne kredis pri sukceso de la ampleksega teksto, sed lia pliaĝiĝinta filo Rayner, tamen konvinkis lin eldoni ĝin, eĉ se la libro kaŭzos etan malprofiton. La eldonejo dividis la seslibran tekston je tri volumoj, donis al ili subtitolojn, kaj kun la komuna titolo *La Mastro de l' Ringoj* ĝi aperis en 1954–1955. La libro furoris en Britio, baldaŭ aperis tradukoj en la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Post la malmultekosta pirata eldono mole bindita en Usono, ĝi iĝis kulta, preskaŭ kiel Biblio de la Alternativa Socio. Sed pri la sukceso de la libro kaj pri ties zelotoj ni jam parolis. *Silmariliono* (1977) kaj *Libro de perditaj rakontoj* (1980) estis eldonitaj posteume fare de lia filo Christopher. Estas preskaŭ nekredeble, ke ankaŭ ĉi tiuj libroj, sufiĉe malfacilaj por legado, havis bonan debiton, same kiel la ampleksa 12-voluma *Historio de Mez-Tero* redaktita de Christopher Tolkien.

La libroj vivas, sed la surtera vivo de la aŭtoro finiĝis 2 sep 1973, du jarojn post la forpaso de Edith. Ili estas entombigitaj kune en la romkatolika parto de la municipa tombejo en Wolvervote,

en la norda apudurbo Oksforda. Sur la granita tombeja plato estas skribite:

Edith Mary Tolkien, Lúthien, 1889–1971
John Ronald Reuel Tolkien, Beren, 1892–1973

Tolkien estis elstara konanto de lingvoj antikvaj kaj raraj. Kompreneble, kiel lingvisto li bone posedis la latinan, helenan kaj ĉefajn lingvojn eŭropajn. Tamen ne ili, sed la lingvoj gota, saksa, kelta, islanda kaj finna, kiujn li lernis per tekstoj literaturaj, fascinis lin, kaj ofte en sia kreado li valorigis la Vorton kiel magiaĵon, kiu kapablas helpi aŭ damaĝi.

Tre bone ĉi tion ilustras la uzado de la magia vorto *Mellon* por malfermi la pordon de Morio, aŭ la malrekomendo de Fangorno diri sian nomon al nekonatoj, kiuj povas misuzi sian scion. Elfaj vortoj kuraĝigas Frodon kaj lian serviston Sam en la malamika ĉirkaŭo. Sed menciado de la nomo de la Malamiko ankaŭ estas evitenda, kaj de lia lando kaj de liaj kreitaĵoj:

“Ni ne parolos pri tiaj aferoj eĉ en la mateno de l’ Provinco”, – Gandalfo diras [1: 74]. “Ne parolu pri tiaj aferoj”, – Paŝegulo diras [1: 218].

Tiaj ekzemploj estas multaj en la teksto. Simile, kristanoj ne nomu la diablon, kiu ja povas veni, aŭdinte sian nomon.

Eĉ pli, mison allogas nura uzado de la lingvo de la Malamiko. Klarigante al Frodo la skribaĵon sur la Ringo, Gandalfo diras:

> La literoj estas elfaj, laŭ la antikva maniero, sed la lingvo estas tiu de Mordoro, kiun mi ne prononcos ĉi tie. Sed en la Komuna Lingvo jen kio estas skribita, sufiĉe fidele… [1: 73]

Supozeble la uzado de la Komuna Lingvo malpliigas la mison, ĉar, kiam Gandalfo devis en Rivendelo diri tion en la originala lingvo, tio kreis tiel malagrablan etoson, ke Elrondo atentigis Gandalfon pri tio [1: 294].

Same kiel Zamenhof, kiu ne kreis sian lingvon de nulo

sed arte uzis ekzistantajn lingvoelementojn, Tolkien kreis sian mondon kaj ties lingvojn ne per mekanika kombinado, nek mem fabrikis ĝin. Lia mondo estas ne artefarita, sed arte farita, kaj tiun arton inspiris pluraj malnovaj verkoj, precipe eposaj, kiaj *Beowulf*, ambaŭ *Edda* kaj sagaoj, *La Kanto de la Nibelungoj*; kompreneble la *Ringo-opero* de Wagner. Kaj la kulturaj reminiscencoj ĝuigas iujn legantojn pli multe ol banala komparo de Saŭrono kun Stalino aŭ Hitlero.

Ekzemplo de malpli konata literatura reminiscenco estas la vizio de la Transa Mondo, kiun havis Drikthelmo (taŭga nomo por Limregna kavaliro, ĉu ne?) en la *Eklezia historio de la popolo Angla* de Baeda Venerabilis, verkita en la 8a jarcento. La baraktado inter la fajro kaj blizardo, kaj la fajroputoj en mallumo neeviteble memorigas pri Morio, dum la lumo, muziko kaj bonodoro ŝajnas esti priskribo de Valinoro[1].

Sed Tolkien ne estas Elias Lónnrot. *Silmariliono* ne estas restarigo de komuna pramito por la islanda, brita kaj germana loroj, same kiel la lingvo Zamenhofa ne estas pralingvo de l' homaro restarigita surbaze de la lingvoj ekzistantaj. Des pli ne estas tia *La Mastro de l' Ringoj*, kun la raso hobita loĝanta en idilia Provinco inter herbejoj kaj montetoj. Se en la romano rolus nur homoj kaj mitologiaj herooj (drakoj, troloj, goblenoj, elfoj[2], la romano perdus la ĉarmon kaj nia-econ. Enmeti en miton la nuntempon, ĉiupaŝe kaj ĉiuaspekte rekoneblan, tute malheroan kaj komfortaman, tio estis defia vojo, kaj profesoro Tolkien ĝin ekiris:

La Vojo ĉiam plu pilgrimas
ekde la pordo de l' komenco.
La Vojo jam tre malproksimas,
kaj mi ĝin sekvos, laŭ intenco,

1 Estas interese, ke Borges jam en 1982 komparis ĉi tiun epizodon kun … *Infero* de Danto. Ĉu mi vane sarkasmis pri Gandalfo kiel Vergilio?

2 La elfoj en Mez-Tero ne similas al la kutimaj elfoj el la fabeloj; ili pli proksimas al la alvoj en *Edda*.

per ritma viglo de l' paŝadoj,
ĝis en vojegon ĝi devias
ĉe l' renkontiĝ' de multaj padoj.
Kaj poste kien? Mi ne scias.

Nun oni konas la vojon, sed ripeti ĝin en Esperanto tamen estis ankaŭ defio. Tiun defion akceptis eldonejo *Sezonoj*, spronita de fragmento el *La Hobito* en la literatura suplemento al la gazeto de ELNA en 1991 per traduko de Don Harlow. Mi proponis al li plentraduki *La Hobito*n, kaj William Auld rapide tradukis ĉiujn poeziajn pecojn[1] el la verko. Kiam la tradukelano de Harlow ĉesis, klariĝis, ke *La Hobito* ne sukcesos aperi je la centjariĝo de Tolkien (1992), kiel estis planite. Ĝi estis eldonita nur post *La Mastro de l' Ringoj*, en la traduko de Christopher Gledhill, en la jaro 2000. La projekto *Tolkien en Esperanto* ŝajnis ekdormi.

Sed en 1993 mi preskaŭ hazarde eksciis, ke Liven Dek havas la tradukon de *La Kunularo de l' Ringo*, kiun li ricevis de William Auld por eldono, sed li ne povis eldoni ĝin, ĉefe, pro financa kaŭzo. Fine ni venis al interkonsento, cedinte al Liven Dek la rajton eldoni *Tirano Banderas* de Valle-Inclán en la traduko de Fernando de Diego, kiu estis eldonota de *Sezonoj*, kaj trikilograma manuskripto de *La Kunularo* somere 1994 atingis nin en Jekaterinburg.

Kia traduko ĝi estas? Multaj recenzoj aperis, kaj ni citu el tiu de Paul Gubbins:

> … malfermu ie ajn la tradukon kaj komparu ĝin kun la originalo. Ĉie – jen la genio de Auld – lingvo natura, neniel tordita … bazare-suka, esprimiva, sed samtempe eleganta, klare klasika:
>
> – Jam temp' está! Jam ek al la lasta peno! – diris Sam, barakte stariĝante. Li klinis sin al Frodo, vekante lin delikate. Frodo

1 La kantoj kaj poemoj el *La Hobito* aperis en *Fonto*, 1994, №162, pĝ. 4–11.

ĝemis; sed per granda vola klopodo li stariĝis ŝanceliĝe kaj poste falis denove surgenuen. Li levis malfacile siajn okulojn al la malbelaj deklivoj de la Monto de Sorto turantaj super li, kaj poste ekgrimpis kompatoveke antaŭen per la manoj.

Sam rigardis lin kaj ploris en sia koro, sed venis neniuj larmoj al liaj sekaj kaj brulsentaj okuloj.

– Mi diris, ke mi portos lin eĉ se tio rompos mian dorson, – li murmuris, – kaj tion mi ja faros!

"Now for it! Now for the last gasp!" said Sam as he struggled to his feet. He bent over Frodo, rousing him gently. Frodo groaned; but with a great effort of will he staggered up; and then he fell upon his knees again. He raised his eyes with difficulty to the dark slopes of Mount Doom towering above him, and then pitifully he began to crawl forward on his hands.

Sam looked at him and wept in his heart, but no tears came to his dry and stinging eyes. "I said I'd carry him, if it broke my back," he muttered, "and I will!"

Lerte-leĝeraj kunmetaĵoj por traduki "pitifully", "stinging", elegantaj elturniĝoj por "struggled to his feet", "staggered up", solvo simpla por eventuale peza elangligo de "last gasp"… plus pra-Esperanta "jam temp' está" kaj modela particip-uzado. Preskaŭ ĉiu linio ion montras, ion malkaŝas por riveli, kiel trafe Auld respondas sian trian demandon: Kiel li dirus tion, se li verkus originale en Esperanto?[1]

Tian analizon oni povus fari pri multegaj lokoj tra la libro, kaj frontinte la redaktadon mi baldaŭ konstatis, ke la traduko de Auld ege superis la du "klasikajn" rusajn tradukojn. (Mi diras "klasikaj", ĉar ili aperis antaŭ la aliaj, da kiuj ekzistas nun dek en la presita formo.)

La traduko de Vladimir Muravjov, komencita de Andrej Kistjakovskij (Moskvo: Raduga, 1991–92), legiĝas preskaŭ kiel

1 *La Brita Esperantisto*, 1998, №941, pĝ. 69–70.

porinfana adaptaĵo, rekte inspirita el la eldono de la “iom koncizigita traduko” (Moskvo: *Detskaja literatura*, 1982). La originalo pereis sub la manoj de l’ plibonigantoj, kvankam la fabeleca lingvaĵo de la Moskva eldono, en la stilo de la rusaj mezepokaj legendoj, estus ja aprobenda, se temus pri verko originala.

La traduko de Nadeĵda Grigorjeva kaj Vladimir Grušeckij (Peterburgo: Severo-Zapad, 1992) estas eĉ pli malbona. La tradukintoj forĵetis aŭ grave reduktis priskribojn de la naturo kaj forigis superfluajn (laŭ ili) rolantojn, kies nomoj nur unufoje aperas en la teksto.

Parenteze, ĉi tiu Peterburga traduko eble plaĉus al Margo Furness, kiu skribis reage al gazeta recenzo:

> Mi konsentas kun la ESK-recenzisto ke la verko enhavas troegan priskribon de pejzaĝoj, kaj eĉ pli de vetero... Eble iu devas konsili al S-ro Auld ke por la tria volumo li forlasu nenecesajn priskribojn...[1]

La prespretiga laboro estis rutina – fraz-post-fraza komparado, kompostado, enpaĝigo, elprinto, provlegado, nova elprinto, poĉapitra sendado al Skotlando, ricevo de faksaj korektoj, korespondado pri ili, korektado, elprintado, plia provlegado, desegnado de mapoj ktp. Sed tio facilus pri alia libro, ne pri tiu ĉi, kiu enhavas plurajn kaptilojn.

Ekzemple, la nom-problemo. Centoj da personoj kaj lokoj estas en la verko, kaj pluraj el ili havas po kelkajn nomojn. Kaj tiu problemo estis traktata fundamente. Ĉiu renkontata nomo estis analizata, komparata kun aliaj nomoj kaj nur poste difinata, sed kelkaj nomoj estis redifinitaj ĉe la definitiva polurado.

Vidu kelkajn ekzemplojn el la tabelo “Nomoj Propraj. Personoj. Hobitoj” kun la tradukoj franca (F. Ledoux, 1973), germana (M. Carroux, 1970), itala (V. Alliata di Villafranca, 1970), rusa 1 (V. Muravjov, 1992), rusa 2 (N. Grigorjeva, V. Grušeckij, 1992), ĉeĥa (S. Pošustová, 1992), Esperanta (W. Auld, 1995).

---

1 *Esperanto sub la Suda Kruco*, 1997, №25, pĝ. 10.

A	Baggins	Brandybuck	Burrowse	Goodbody
F	Sacquet	Brandebouc	Fouine	Bravet
G	Beutlin	Brandybock	Lochner	Gutleib
I	Baggins	Brandibuck	Rintanati	Boncorpi
R1	Torbins	Brendizajk	Glubokop	Dorodning
R2	Sumniks	Brendiskok	Krott	Sdobs
Ĉ	Pytlik	Brandorád	Pelišek	Dobraček
E	Baginzo	Brandoboko	Subfoso	Bonkorpo

A	Sackville-Baggins	Sandyman	Took
F	Sacquet de Besace	Rouquin	Touque
G	Sackheim-Beutlin	Sandigmann	Tuk
I	Sackville-Baggins	Sabbioso	Tuc
R1	Lakoŝelj-Torbins	Peskuns	Krol
R2	Derikul-Sumniks	Pesoŝkins	Tuk
Ĉ	Pytlik ze Saček	Piskař	Bral
E	Retikul-Baginzo	Sablomano	Tjuko

Atentu la malsamecon de la nomoj en la du rusaj tradukoj. En la reto estas troveblaj komparaj tabeloj de *ĉiuj* nomoj laŭ la dek unu rusaj tradukoj. Ekzemple, por la plurala “Goodbodies” ni trovas sep malsamajn[1] formojn en la dek unu tradukoj: Dorodningi, Sdobsy, Gudbodi, Tolstingi, Upittansy, Brjuĥstony, Debellingi.

Entute, se temas pri nomoj, Auld decidis traduki nur iujn el la senchavaj nomoj anglalingvaj, la nomoj elfaj restis netradukitaj. Post hezitado li tamen decidis, ke Baggins estu nur asimilita je Baginzo, ne tradukita je Sakinso. La arta gusto de Auld estis por li kriterio pli alta ol eĉ la iom pedanta konsilaro de Tolkien pri tradukado de la nomoj.

Netradukitaj nomoj kutime estas asimilitaj per la finaĵo *-o*

1 Ili ja estas malsamaj, sed iusence ankaŭ samaj, ĉar neniu el ili entenas la rusajn tradukojn de *good* kaj *body*.

(viraj nomoj), aŭ *-a* (virinaj nomoj). Ĉi tiel Esperanto ekhavis ne nur Baginzon, sed ankaŭ Gandalfon, Saŭronon, Sarumanon, Boromiron, Legolason, Galadrielan, Elrondon… (Krome aperis en nia leksiko *hobitoj*, *orkoj*, *palantiroj* kaj *lembasoj*.)

Kelkaj nomoj estis nur duone tradukitaj, ekzemple – Ombrofakso kaj Sablomano, en kiuj *faks* kaj *man* povas esti miskomprenataj kiel Esperantaj radikoj. Sed tiel ofte okazas en lingvoj naciaj, kaj ankaŭ la reĝo Brando povas elvoki misimagon pri reĝo-drinkulo.

Se la nom-problemo estis iel solvita (iuj proponis traduki ĉiujn nomojn, aliaj kondamnis eĉ la ideon pri nom-tradukado), restis nesolvita la problemo pri tradukado de arkaismoj – ĝi estas principe nesolvebla en Esperanto, kaj la paliativaj proponoj de Kalocsay kaj Halvelik ne trovis subtenon de esperantistoj. Pro tio la Esperanta teksto eble estas iom malpli suka ol la originala, sed mankas en Esperanto la stila diferencigo kaj arkaismoj, kiujn havas la angla kaj la aliaj naciaj lingvoj, al kiuj la romano estis tradukita.

Vigla sed subnivela estis posta retforuma diskutado pri tradukendo kaj/aŭ asimilendo de la propraj nomoj, kiu daŭris longe, kaj kiu daŭros longe, same kiel samtema diskutado en la ruslingvaj retforumoj tolkienistaj. Tamen en sia kritika studo[1] Andreas Emmerich, krom kutime komenti la nomojn kaj arkaismojn, atentis ankaŭ la gravajn problemojn pri tradukado de la patoso, de la lingvo de la sovaĝuloj, de la intence malĝustaj lingvaj formoj, ktp. Bedaŭrinde, liajn atentigojn ne povis legi la tradukinto, jam tre malsana, sed ili estos utilegaj por tiuj, kiuj eble iam akceptos defion denove traduki la romanon aŭ frontos *Silmarilionon*.

Tamen, kiel jam dirite, la Esperanta teksto estas bonega en si mem. Ĝi tre bone legiĝas, ĝi estas klara, ĝi estas riĉa leksike, ĝi estas elasta kaj esprimiva – malmultaj beletraĵoj en Esperanto estas tiaj.

1 Diplomverko ĉe la universitato UAM (Poznań), ankoraŭ ne eldonita.

La Kunularo de l' Ringo, la unua parto de *La Mastro de l' Ringoj*, estis lanĉita en la librotago de la 80a UK (1995) en Finnlando, kiu lando aparte gravis por Tolkien pro la lingva kaj muzika (Sibelius) influo.

La duan parton, *La Du Turegoj*, unu jaron poste premiere prezentis la tradukinto mem en la kongresa librotago en Prago (1996).

En 1997 sekvis *La Reveno de la Reĝo*, la lasta parto de *La Mastro de l' Ringoj*. Tiel la grandioza projekto estis efektivigita.

Pri la takso de la legantaro elokvente diras la fakto, ke du jarojn post la eldono *La Kunularo* estis elĉerpita, kaj *Sezonoj* reeldonis ĝin, utiliginte la dankindajn atentigojn de Ulf Lunde kaj Edmund Grimley Evans pri miskompostaĵoj en la unua eldono. Ankaŭ la dua kaj la tria partoj tre rapide elĉerpiĝis, kaj dum kelkaj jaroj *La Mastro* mankis en la Esperanta libromerkato.

Nur en 2007 – dek jarojn post la la unua eldono – danke al prunto de FAME-Fondaĵo kaj de nia amiko, kiu ne volis diskonigi sian nomon, la legenda verkego de Tolkien denove aperas en la Esperanta libromerkato en eleganta grafika vesto de Vladimiras Beresniovas (Litovio).

William Auld ne ĝisvivis la reeldonon, sed li sukcesis konsenti pri kelkaj ŝanĝoj (ekzemple, pri *Markio*) kun la redaktoro, al kiu li ankaŭ donis la rajton korekti eventuale trovotajn miskompostaĵojn kaj traduk-erarojn. Ilin serĉis (kaj trovis!) Brian Drake, Andreas Emmerich, William Harmon. Valorajn konsilojn donis ankaŭ Bertilo Wennergren (kiu tradukis du aldonajn tekstojn), Hoss Firooznia, Edmundo Grimley Evans kaj Aleksandr Osokin. Povilas Jegorovas helpis ĉe la traktado kun la presejo kaj la pentristo.

Koran dankon al ili pro ilia kunlaboro, kiu faris la tradukon de William Auld iomete pli majstra ol ĝi estis.

Nun neniu serioza esperantisto komencu gravan prozan tradukon sen lerni la metodojn, kiujn la skota bardo aplikis en *La Mastro de l' Ringoj*, samkiel poezia tradukanto ne povas ignori la Kaloĉajan *Inferon* kaj la Dediegan *Ciganan romancaron*. Tio estas speciale konsiderinda, ĉar en la Esperanta prozo la tradukoj

ankoraŭ dominas. En la lastaj jaroj aperis en Esperanto *La Majstro kaj Margarita, Cent jaroj da soleco, Dekamerono, Faŭsto, Krimo kaj puno, Tirano Banderas, Ruĝdoma sonĝo, Švejk* kaj … *La Mastro de l' Ringoj*. Kiu kuraĝas apudmeti egal-signifan liston de prozaĵoj verkitaj originale en Esperanto?

La kritiko ankaŭ en Esperantujo ofte pilorias tion, kion ŝatas la publiko. Feliĉe, ne tia estas la kazo de *La Mastro*. Anstataŭ mi finparolu Paul Gubbins el la jam citita recenzo en *La Brita Esperantisto*:

> Mi emas diri – volante lezi nek memoron nek valoron de Tolkien – ke la Auld-a traduko, almenaŭ al Esperantisto, pli gravas ol la Tolkien-a romano mem. Auld ne simple peras rakonton, li peras lingvon, stilon, (traduk-)arton. Li lecionas al ni … subtile, delikate, sentrude … se ni pretas lerni. Ĉio imitinda, ĉio modela. Malmultas tradukoj, pri kiuj eblas tion diri.

Pri ĉi tiu libro

La papera eldono:

Korĵenkov, Aleksander. *Unu Ringo ilin regas: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto*: Prelegoteksto. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 16 paĝoj; 300 ekzempleroj. — (Serio *Sed ne el katedro*; №4)

© Aleksander Korĵenkov, 2008.

La papera versio estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA.

La elektronika eldono:

Aleksander Korĵenkov.
Unu Ringo ilin regas: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011.
Virtuala Biblioteko; №10.

© Sezonoj, 2012.

Ĉi tiu prelego estis plurfoje prezentita en esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj, laste en BET-43 (Šiauliai, 2007), Arta Lumo (Kuopio, 2007) kaj ARKONES XXIII (Poznań, 2007). Unu el pli fruaj versioj de la prelegoteksto aperis en *Lingva Arto*, jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton (Rotterdam: UEA, 1999, pĝ. 92–100).

Ĉi tiu senpaga eldonaĵo estas nur por privata legado, ne por pludistribuo. Oni ne rajtas sen permeso de la editoro (Aleksander Korĵenkov) publikigi ĉi tiun libron plene aŭ fragmente en iu ajn papera kaj elektronika formo.

Kontakt-adreso: sezonoj@yahoo.com

Virtuala Biblioteko de *Sezonoj*

№1. Aleksandr Puŝkin. *La pika damo.*
Tradukis Aleksander Korĵenkov.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 30 paĝoj.

№2. Anton Ĉeĥov. *Sveda alumeto.*
Tradukis Aleksander Korĵenkov.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.

№3. Edgar Allan Poe. *La falo de la domo Usher.*
Tradukis Edmund Grimley Evans.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.

№4. Fjodor Dostojevskij. *Blankaj noktoj.*
Tradukis Grigorij Arosev.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 48 paĝoj.

№5. Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj.*
Tradukis William Auld.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 168 paĝoj.

№6. Harrison, Harry. *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato.*
Tradukis Reinhard Fössmeier, Edmund Grimley Evans,
Rob Helm, Konrad Hinsen, Pierre Jelenc, Jorge Llambías,
Kevin Schoedel, Mark Weddell.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 195 paĝoj.

№7. Nikolaj Gogol. *Palto.*
Tradukis Aleksander Korĵenkov.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 35 paĝoj.

№8. Aleksander Korĵenkov. *Fjodor Dostojevskij en Esperanto*.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 33 paĝoj.

№9. Charles Dickens. *La postlasitaj paperoj de la Klubo Pikvika.*
Ĉapitroj 1–7.
Tradukis el la angla William Auld.
Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 121 paĝoj.

№10. Aleksander Korĵenkov.
Unu Ringo ilin Regas: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 22 paĝoj.



Tolkien en Esperanto